Deklaro de Universala Esperanto-Asocio okaze de la Internacia Tago de Ne-perforto 2019

Ĉiujare, Unuiĝintaj Nacioj festas la 2-an de oktobro kiel Internacian Tagon de Ne-perforto – tagon kiam ni laŭdas la potencon de pacaj ideoj por movi la homaron al la bono. En tiu tago en 1869 (antaŭ ĝuste 150 jaroj), naskiĝis la granda pioniro de la filozofio kaj strategio de ne-perforto, Mahatma Gandhi.

Mahatma Gandhi nomis ne-perforton “la plej granda potenco je la dispono de la homaro” kaj Martin Luther King priskribis ne-perfortan reziston “kuraĝa konfrontiĝo de malbono per la potenco de la amo.”

Universala Esperanto-Asocio aparte emfazas la potencon de lingva komunikado kiel instrumento de ne-perforto. Per parolo kaj skribo, la homo povas persvadi, insisti, rezoni – sen turniĝi al perforta konfrontiĝo. Sed tio eblas nur tiam kiam ambaŭ flankoj parolas la saman lingvon. Tro ofte, la komunikado kolapsas pro malsameco de lingvoj, aŭ pro la nekapablo de parolantoj de malsamaj lingvoj adekvate transponti tiujn diferencojn. Kaj tro ofte, kiam homoj ĉesas kompreni, ili komencas batali.

Mahatma Gandhi komprenis tiujn fundamentajn verojn. Li proponis la alproprigon de Esperanto kiel ilo de interkomunikado “por ĉiuj popoloj” kaj kune laboris kun unu el la unuaj prezidantoj de Universala Esperanto-Asocio, la svisa diplomato kaj klerulo Edmond Privat.

La Internacia Lingvo Esperanto estis kreita por transponti la diferencojn inter lingvoj, formante bazon por ne-perforta komunikado kaj la antaŭenigo de interkompreniĝo. La statuto de Universala Esperanto-Asocio asertas, ke “bonaj internaciaj rilatoj kaj la respekto de la homaj rajtoj, tiaj, kiaj ili estas difinitaj en la Universala Deklaracio de la Homaj Rajtoj kaj aliaj internacie rekonataj instrumentoj estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj.” Surbaze de tiu statuta postulo, la Asocio nete kondamnas ĉiun specon de perforto.

“Gandhi konstante substrekis la fendon inter tio kion ni faras kaj tio kion ni kapablas fari,” lastatempe rimarkis la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj António Guterres. “Mi alvokas al ni ĉiuj, ke ni faru ĉion kion ni povas fari por transponti tiun breĉon per strebado konstrui pli bonan estontecon por ĉiuj homoj.”

Okaze de la Internacia Tago de Ne-perforto, Universala Esperanto-Asocio ree konfirmas sian kunlaboron kun Unuiĝintaj Nacioj por krei pli pacan kaj pli kompreneman mondon laŭ la spirito de Mahatma Gandhi kaj la ne-perforto kiun li adoptis.

Office of the Universal Esperanto Association at the United Nations
777 United Nations Plaza, New York, NY 10017.
212-687-7041